# TEJO-aktuale: numero 45, 2002-01

## KONKURSO: FRAPFRAZIGU TEJO-N!

Chu vi audis pri "Connecting People", "Intelligence Everywhere", "Obey Your Thirst" au "Intel Inside"? Vershajne jes... Multaj firmaoj kaj organizoj havas tiajn fraprazojn/sloganojn. La celo estas per kelkaj vortoj doni bonan impreson, etosigi kaj allogi homojn. Estus tre bone se ankau TEJO havus belsonan, bonetosan kaj allogan frapfrazon! Vershajne ghi rilatus al "mondo/ lingvo/amikeco sen limoj" au io simila. Au eble vi havas tute alian ideon? Pro tio ni nun starigas konkurson: sendu vian frazon antau la 31a de marto al frapfrazo@tejo.org au al Hokan Lundberg, Fisksatra Torg 12, SE-13341 Saltsjobaden, Svedio.
Ideale la slogano taugu por prezenti TEJO-n kaj al E-istoj kaj al aktivuloj de aliaj junularaj organizoj. Ankau estas pluso se ghi bone funkcias kaj E-e kaj angle. La kreintoj de la tri plej bonaj frazoj ricevos premion (la novan T-chemizon de TEJO kun la gajninta frazo). Sukceson!

La informad-teamo de TEJO informado@tejo.org.

## TEJO.ORG: UNUA PASHO FINITA

TEJO pasintjare achetis la retregionon kaj nun laboras por tien translokigi sian pagharon, samtempe renovigante kaj rearanghante ghin. La unua pasho de la renovigo estas finita: vi povas vidi la rezulton che http://www.tejo.org! La dua pasho vershajne pretos meze de februaro.

La TTT-teamo de TEJO http://www.tejo.org/ttt.jsp.

## TEJO.ORG: FOTOALBUMO PRI LA LASTA TEJO-SEMINARIO

La nova retejo de TEJO gastigas ankau fotojn (bele kaj amuze prilaboritajn) el la lasta seminario "Esperanto @ Interreto" okazinta en Uppsala (Svedio): vizitu http://www.tejo.org/seminarioj/echei2001-albumo.jsp.

## KONCERTO DE "KAJTO" EN NORDA FRANCIO

Kadre de kongreso de Nordfranca E-Federacio (Esperanto-Nord), la nederlanda muzikgrupo Kajto koncertos en Villeneuve-d'Ascq, dimanchon la 24an de marto 2002, posttagmeze. Rezervu viajn biletojn telefonante al +33 (0)320832195 (Jean-Michel) au +33 (0)616984102 (Michel).
Rete: asso@lve-esperanto.com.

La kanto "Dormu milde", el la lasta albumo de Kajto, haveblas en la formatoj RA kaj MP3 che http://www.lve-esperanto.com/actualite.